# LA SKOLTA MONDO.

Trimonata revuo		Organo de Skolta Esperanto Ligo



Volumo 5
N-ro 7-8

Jul-dec. 1977

S ☆ E ☆ L

SKOLTA ESPERANTO LIGO
Postbus 433
Zaandam Nederlando
Poŝtĝirkonto 54.36.47
*******

Fondinto "Avoto", A.W.Thomson.
Kunfondinto: J.W. Leslie.

Honoraj Prezidantoj:
Avoto, Norman Booth, D. H. Davis, L. J. VanGulck.

Prezidanto: John Berggreen, Brattvollveien 23c, Oslo 11 Norvegujo. Tel. 02-283035.

Sekretario: J. K. Hammer, Taxusstraat 7, Zaandam-1400 Nederlando. Tel.075-166931.

Kasisto kaj Administranto de "La Skolta Mondo": David H. Withey, 21. Brookfield Avenue, Waterloo, Liverpool L 22 3ye, Britujo. Tel. 051-928-2936.

Redaktoro: Hans Amund Rosbach Bamleveien 2, 3700 Skien, Poŝtĝirkonto 8030413, Tel. 035-21848.

Membroj de la Centra Komitato:
Allan Fineberg, 76 Seventeenth Av., Paterson, NJ-07531, Usono.

Ŝindo-Seitaro, Nisi-mikuni 1-tyôme 200, Higasi-yodogawa-ku, Osaka-si, Japanujo.
******

La Skolta Mondo aperas kvarfoje en la jaro.

Okaze de nericevo, bonvolu informi la Nacian Reprezentanton aŭ la Administranton.

Kotizojn oni prefere pagu al la Nacia Reprezentanto. Se tia ne estas en la lando, prefere al la Kasisto!

# Duobla

Laŭ la numerado de niaj numeroj tio ĉi estas duobla numero. Sed laŭ la enhavo kaj paĝonombro ĝi estas tute ordinara.
Kial?
Nu, nia espero, ke la 2a numero de la jaro atingu vin ĝustatempe ests vana, ĉefe pro la fakto, ke la feria tempo kaj la U.K. en Reykjavik malebligis al la presejo presi la gazeton.
Kaj ĉar la 2.a numero ja venis tiel malfrue, ni ne deziris eldoni la trian tuj poste, aŭ eble eĉ jam antaŭ la dua. Kaj, fine, ĉar tiu "duobleco" grave helpas al nia ekonomio, ni tiel faras.
Sed en la venontaj jaroj ni esperas denove esti same precizaj kiel antaŭe

Nun mi samtempe petas:
Bonvolu noti mian novan adreson. La poŝto algluadas admonojn al mi informi pri la adresoŝanĝo kaj mi ree tion faras:

La Skolta Mondo, redakcio, nun havas la adreson

Bambleveien 2,
3700 Skien, Norvegujo.

# SEL-kunveno dum U.K.

La kunvenon gvidis la prezidanto de SEL, John Berggreen - skoltuniforme vestita - kiu bonvenigis la ĉeestantojn, 12 personoj el 10 landoj.
Unua programero estis memoriga parolado fare de la prezidanto pri la forpaso de unu el la pioniroj de SEL, Norman Booth, antaŭa prezidanto de SEL kaj ĝis nun Honora Prezidanto.
Sekvis la Jarraporto 1976, legita de P.Ronald Post tio la prezidanto detale raportis pri la Agadplano 1975/77 de SEL, precipe pri la eldono de la libreto Vastaj Horizontoj En Internacia Skoltado. La libreto temas pri skoltaj aktivecoj en internacia skoltlaboro, kaj ĝi havas antaŭparolon de la ĝenerala sekretario de La Monda Skolta Oficejo en Ĝenevo, Laszlo Nagy. Ĝi eldoniĝis en 6 lingvoj, angla, franca, nederlanda, norvega, germana kaj japana. Dum la aŭtuno aperos la libreto krome en la hispana kaj araba, kajespereble antaŭ kristnasko en la itala kaj portugala, do entute en 10 lingvoj. Kompreneble la libreto montras al Esperanto kiel taŭgan rimedon en la internaciaj rilatoj de la skolta movado. La Monda Skolta Oficejo afable prenis sur sin la taskon dissendi la libretojn - kune kun saluto de SEL kaj mendilo por novaj mendoj - per oficiala poŝto al ĉiuj naciaj skoltasocioj en 110 landoj, petante ankaŭ raporton pri la aplikado de la libretoj en la koncerna nacia skoltasocio. La kampanjo fariĝis tiamaniere tre sukcesplena kaj signifas valoran informadon pri Esperanto en la vastega kampo de la skoltado, havante 22 milionojn da membroj!
Poste sekvis salutoj diverslandaj, kaj fine okazis debato pri la venonta ĵamboreo okazonta 1979 en Irano.

Raportis
John Berggreen



La ĵamboreejo en Iran, kia ĝi estas nuntempe.

# Diversaĵoj.

La Asocio de Esperantistoj /Instruistoj de Nov-Zelando informas en angla-lingva cirkulero:
"Bonan Tagon" estas la nomo de kurso sendita per radio al Queensland School. Post enkonduka parolado okazis 12 radioelsendoj 5-minutaj en sinsekvaj semajnoj, kaj post la radioaŭskultado en la lernejoklasoj okazu 25-minuta aktiveco bazita sur alsendita presitaĵo.
La kurso estis tiel sukcesa ke oni faros novajn!

*

Ĉu inter la 10-12 jaraĝuloj estis skoltoj?

## *Maroko*

Nia peranto en Maroko, s-ro Mas, transloĝiĝis al Francujo, ĉar liaj profesiaj taskoj en Maroko finiĝis. Ni dankas lin pro lia poresperanta kaj la por-SEL-a laboroj en Maroko, kaj fidante je lia plua kunlaboro en Francujo, ni deziras al li ĉian sukceson.

## *hispano*

Fervora esperantistoj kaj kolektanto de esperantaĵoj s-ro Ramon Molera (adreso: Sta Joaquina, 13, Moyá, Barcelona, Hispanujo) sendis al ni peton pri diversaj ekzempleroj de LSM. Ni sendis el nia stoko, sed ankoraŭ mankas al li n-ro 9 el la vol 4, do la dua el la jaro 1971. Ĉu iu povas havigi ĝin al li?

## *anglo*

Alia esperantisto, skolto kaj studento, nia membro el Anglujo, deziras uzi siajn lingvosciojn al mondvasta korespondado:
19-jara skolto volus korespondi kaj interŝanĝi insignojn, fotojn, kantojn, k.s. (kaj eble vizitojn!) kun samaĝaj geskoltoj.

# EL REYKJAVIK

Inter la multaj kunvenoj kiujn mi ĉeestis, mi volas mencii 3, kie SEL iamaniere ludis rolon. La 1- an de aŭgusto okazis kunveno de respondeculoj de landaj asocioj, kun debattemo ALTIRO DE NEMEMBROJ AL LA ORGANIZITA MOVADO. Laŭ invito de s-ro Borman, vicprezidanto de UEA, mi faris enkondukan paroladon (kune kun s-ino Grattapaglia el Brazilo), kaj mi priparolis interalie kiel ekzemplon pri taŭga metodo por veki intereson inter neesperantistoj la Agadplanon de SEL kaj la evoluon de la libreto.

La alia kunveno okazis la 6-an de aŭgusto en kunveno "Asambleo de fakaj asocioj", kie mi detale raportis pri nia kampanjo 75/77. Ŝajne interesiĝis la ĉeestantoj, ĉar multaj poste faris al mi demandojn pri nia agado.

Dum la 2-a ĝenerala kunsido de UEA mi mallongepetis klarigon pri la diversaj manieroj kunlabori kun UEA - kiel fakorganizaĵoj aliĝintaj, kunlaborantaj, ne ligitaj - samtempe menciante ke SEL havas tre bonan kunlaboron kun UEA.
Cetere mi estis invitita al la Oficiala Akcepto en la hejmo de la prezidanto de Islando la 5an de aŭgusto.
Dum la 8-taga restado en Islando mi uzis la eblecon trovi novajn kontaktojn utilajn por SEL. Unuavice mi volas mencii interparolon kun s-ino Sadighi, el Irano, kies edzo estas skoltestro. Ŝi rakontis al mi, ke nuntempe 2000 personoj partoprenas en Esp.-kursoj en Teherano, kaj ŝi promesis helpi al SEL rilate al la ĵamboreo tie en 1979.

John Berggreen.

# Mars-Kanaloj 100 jaraj

Aftenposten

En la nuna aŭtuno pasis 100 jaroj post la malkovro de la kanaloj sur Marso. En la somero kaj aŭtuno 1877 Mars estis tiel proksima al la tero, kiel ĝi povas veni. Samtempe kun la kanaloj oni malkovris la du Marslunojn Phobos kaj Deimos. En la pasintaj cent jaroj niaj scioj pri la ruĝa planeto kreskis - sed dum la unuaj 90 jaroj nur malrapide kaj pene. La kosmo-ŝipoj revoluciis la esploron de Marso, kaj nun mi konas ĝin multe pli bone ol la aliajn planedojn.
Pri tio skribas Johnny Skorve en la norvega gazeto Aftenposten, kiu ne nur permesas al ni redoni la

Nomo kaj adreso:
Robert Haddon, 6 Romney Broadwalk, Bognor Regis, West Sussex PO22 9BD, Anglujo.

*prezidanto*

Nia prezidanto, s-ro John Berggreen, nun elektiĝis prezidanto ankaŭ de Norvega Esperantista Ligo. Jam dum kelka tempo li estis ties ĝenerala sekretario, kaj la kunlaboro inter SEL kaj NEL ĉiam estis glata. Ĝi certe ne iĝos pli malbona nun! Gratulon, John!

*renversita*

La antaŭa numero de LSM ja prezentiĝis kun renversita kovrilo, tiel ke la unua paĝo iĝis lasta, kion niaj legantoj certe vidis.
Ni esperas, ke la eraro ne ŝajnas al vi tro granda!

*revuo*

La revuo HOMO KAJ KOSMO el Jugoslavujo sin prezentas kun tre interesa enhavo.
La n-ro 1-2 por la 1.a jar-duono 1977 celebras la 20 jarojn de la "Kosma erao", kaj ankaŭ havas artikolojn pri Kvazaroj kaj pri "Falo en "nigran truon" de la kosmo. Ankaŭ la rubriko "Vidindaĵoj en la ĉielo" estas tre valora.

*konto*

El "MONDKOMERCA ELDONEJO ESPERANTISTA" ni ricevis folion kun konto-karto al manfarata librotenado. Tre praktika por loka societo, malgranda entrepreno k.s.

*ĉu*

El Britujo ni ricevis malgrandan anglalingvan broŝuron pri skoltismo kaj la Internacia Lingvo. Niajn gratulojn.
Sed ankaŭ kritiketo: Oni skribas, ke skoltojn sub la diversaj indikoj oni trovas

artikolon, sed ankaŭ promesis pagi la honorarion al s-ro Skorve, se li postulos tian.

En la somero kaj aŭtuno 1877 centoj da astronomoj observadis Marson, kaj unu el ili estis la italo Schiaparelli. Tiu akraokula astronomo ekvidis maldikajn liniojn sur la planedsurfaco. Oni kelkfoje jam antaŭe estis vidinta tiajn liniojn, sed Schiaparelli estis la unua, kiu faris sistemajn observadojn de la linioj, de li nomitaj kanaloj. Sur la mapojn de Marso li desegnis la posiciojn, kaj la kanaloj aspektis kiel plektaĵo de maldikaj, grizaj linioj, kiuj kelkfoje esitis malhelgrizaj, bluaj aŭ verdaj. La kanaloj karakteriziĝas per tio, ke ili iras inter malhelaj areoj, kaj je la krozpunktoj estas malgrandaj, malhelaj makuloj, nomitaj oazoj.

Marsloĝantoj?

La intereso pri la mars-kanaloj kreskis grandskale ĉar ilia rektlinieco nature gvidis al la penso, ke ili estus artefaritaj - produktoj de la aktiveco de Marsanoj! Konsiderante, ke la planedo devas esti tre seka, kelkiuj opiniis, ke la kanaloj estis konstruitaj por gvidi akvon de la polusaj areoj al la distriktoj ĉe Ekvatoro.
Unu el tiuj al kiu plaĉis tiu ideo, estis la amerika riĉulo Percival Lowell. Li konstruigis observatorion specialan ĉe Flagstaff en Arizono por esplorado de Marso. La observadoj de la Lowellobservatorio komenciĝis en 1894, kiam Schiaparelli jam surmapigis 113 kanalojn. Lowell kun sia personaro esploradis la planedon, kaj la mapo kiun ili ellaboris, havis 437 kanalojn. Lowell observadis la planedon regule dum 22 jaroj, sed ankaŭ vico de aliaj akraokulaj astronomoj - antaŭ kaj post Lowell - esploris la planedon sisteme. Kelkaj el tiuj trovis la reton de kanaloj, kiel Schiaparelli kaj Lowell, dum aliaj havis alian impreson.
Ili ne trovis la kanalojn, sed la surfaco de Marso




La planedo Marso fotografita de Mariner 7, kiam ĝi en aŭgusto 1969 estis 470 000 km for. Sube la suda poluso. La montrilo montras la rondan Olympus Mons, kiu poste montriĝis 27 000 m alta kaj 600 km larĝa vulkana monto.
[illegible] bildoj montras la evoluon de esplorado dum nia tempo.

de "Cape Town to Copenhagen from Yokohama to New York" Kopenhago ja estas grava, sed la tutaj Svedujo, Norvegujo kaj Finnlando estas pli nordaj! Kaj en la urbo Hammerfest - la plej norda de la mondo - estas skoltoj

## ĉu vere?

Pri la angla:
Kvankam la somero pasis ni volas redoni historion kun lingva konfuzo, okazintan en germana montara vilaĝo. Ĝi montras, ke la slogano "ĉiu parolas la anglan" ne pravas.
Angla sinjorino decidis resti en la germana vilaĝo dum sia ferio, sed ĉar ŝi mem ne scipovis la germanan ŝi sin turnis al la vilaĝa instruisto pri informoj. I a ŝi volis scii, ĉu en la vilaĝo ekzistis WC. Sed la germano neniam estis aŭdinta tiun mallongigon, kaj pro tio sin turnis al la pastro. La pastro fidis ke la anglino estas piulino, kaj ke ŝi pensas pri "Wood Chapel", kio signifas enarbara preĝejeto. Pro tio la anglino ricevis jenan respondon:
Estimata sinjorino.
W.C. situas proksimume 10 kilometrojn for de la domo en kiu vi loĝos. Ĝi estas malfermita en mardoj kaj en vendredoj. Eble tio estas al vi iom malkonvena, se vi kutimas pli regule viziti la WC, sed certe estas al vi ĝojo aŭdi, ke multaj kutimas kunpreni manĝaĵojn kaj resti tie dum la tago. En la somero ĉiam estas multaj homoj tie, pro kio mi konsilas al vi sufiĉe fruhore ekiri. Tamen estas ja 80 sidlokoj, kaj se vi iam tromalfruas, abundas loko por stari. La sonorilo sonoras 10 minutojn antaŭ la malfermo de W.C. La situo en bela abia arbaro estas bela, kaj vi havos belan ĉirkaŭrigardon, kaj eĉ la plej malfortajn sonojn vi certe povos aŭdi.



El sia rondiro ĉirkaŭ Marso Mariner 9 faris ĉi tiun bildon en januaro 1972. Ĝi montras la vulkanon Olympus Mons. Sur la supro ni vidas la krateron, kiu mezuras ĉ 65 km. Blanka kvarangulo montras la pecon, kiun montras nia tria bildo.

aspektis kiel komplikita kaj kunmetita mozaiko de helaj kaj malhelaj areoj. Oni ankaŭ trovis, ke en periodoj kun speciale trankvila kaj diafana aero, la kanaloj disiĝis al amaso da malgrandaj, neregulaj detaloj de la surfaco.
Oni do ne sukcesis trovi la solvon de la diskutoj pri Mars-kanaloj, kaj ĝis la komenco de la 1960-jaroj, tio estis senresponda demando, kvankam la pensoj de Lowell pri inteligenta aktiveco neniam trovis veran subtenon en sciencaj rondoj. Fotoj ne povis doni klaran respondon, simple ĉar la distanco al Marso estas tro granda por bildoj kun la necesaj detaloj.

Fotoj de kosmoŝipoj.

Novajn kaj decidigajn sciojn ni ricevis en la periodo de 1965 ĝis hodiaŭ. En 1965 la amerika Mariner 4 preterpasis la planedon kaj estis la unua ŝipo kiu fotis Marson je malgranda distanco. Poste la aliaj miloj da bildoj faritaj de la Ruĝa Planedo lasis al ni neniun dubon: Ne ekzistas iu kanala sistemo sur Marso. La malnova konjekto, ke tiuj dependis je optika ilusio, ŝajnas prava.
Bildoj kiujn faris Mariner 9 en 1971/72 kaj Viking 1 kaj 2 dum la lasta jaro, montras, ke Marso havas tre varian pejsaĝon, i.a. kun tre profunda valo, pluraj mil metrojn profunda kaj 5000 m longa, kaj 27 km alta vulkano kaj sekiĝintaj riveroj. Sed la novan bildon de Marso ni ne ĉi tie pritraktos.

Universala Esperanto-Asocio demandas:
Ĉu vi volus labori por Esperanto?
Kompreneble nur tre malmultaj profesie laboras por Esperanto, nur kelkaj en la oficejoj de la pli grandaj asocioj. La ceteraj laboras sensalajre, kaj kelkaj eĉ havas sufiĉe grandajn elspezojn por sia aktiveco. Tiel oni povas nur miri ke en Esperanto aperas libroj kaj gazetoj, okazas kursoj kaj kongresoj, ke Esperanto ne estas ankoraŭ nur projekto.
En UEA estiĝis lastatempe kadro por pli bona utiligo de volontulaj laborfortoj: La Volontula Servo. Al tiu servo sin anoncas personoj pretaj al ia laboro, - kaj aliflanke instancoj, kiuj bezonas volontulan helpon. Kaj la Volontula Servo celas interligi la bezonojn, per kartaro, en kiu registriĝas ĉiuj informoj. Ju pli kreskos la kartaro, des pli da ŝancoj ĝi havos por kontentigi la bezonojn.
Se vi interesiĝas pri la Volontula Servo, turnu vin al la Centra Oficejo de UEA Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.


## *UK*

63-a Universala Kongreso okazos en Varno, Bulgario.

Ni ricevis la Unuan Oficialan Bultenon, kiu informas pri "provizora programo" - kun la ordinaraj punktoj. Varna estas urbo ĉe "Nigra Maro". La kongreso okazos en la Sporta Palaco. En la bulteno estas grava atentigo, ke bulgaraj esperantistoj ne rajtas pagi ion por siaj eksterlandaj amikoj.

Kion la fotoj rakontas.

La unuan bildon (ĉiuj bildoj estas de Nasa) faris Mariner 4 tri tagnoktojn antaŭ ĝi preterpasis la planedon, kaj ĝi montras multe pli da detaloj ol ni povas vidi per teleskopo-observado. Kiam la sciencistoj vidis tiun kaj aliajn bildojn, ili ekkredis, ke la ringoforma strukturo Ilympus Mons, pli frue konata kiel Nix Olympica, estis granda kratero. Post kiam Mariner 9 en 1971 ekĉirkaŭadis Marson, oni unuafoje ricevis proksimajn fotojn de Olympus Mons (nia dua bildo). Oni ektrovis, ke ĝi ne estis kratero, sed giganta vulkanmonto, dekunu fojojn tiel alta kiel la Galhøpiggen, la plej alta monto de Norvegujo. La pinto - la "kaldero" konsistas el pluraj krateroj de diversaj grandecoj,



Mozaiko el bildoj kiujn Viking 1 faris de la pinto de la kratero Olympus Mons en junio 1977. La bildoj estas prenitaj de 300 km alteco kaj montras detalojn ĝis 18-metraj. La Mozaiko kovras areon de 40 x 70 km. La plej profunda kratero, supre sur la bildo, havas diametron de 25 km kaj profundon de 2400 - 2800 metroj. La muroj kliniĝas je 32 gradoj. Malsupre, maldekstre oni vidas lafotorentojn.

situantaj unu ene en la alia.
Jam dum pli ol unu jaro Viking 1 kaj 2 observadis la planedon de siaj ĉirkaŭiroj. Kaj en tiu ĉi somero bildoj fariĝis de nur 300 km.a alteco. Vidu la supran mozaikon kun ties teksto.
Ĉio ĉi prezentas unikan, nekredeblan evoluon. En 1964 ne estis eble vidi detalojn pli malgrandajn ol 30 km, kaj nun ĝis 18 metroj! Kaj se ni ankaŭ kunklakulas la du Viking-laboratoriojn, kiuj surbordiĝis sur Marso, tiuj transsendis bildojn de la lokoj kiuj montras sablerojn kun grandeco de nur unu milimetro.


Johnny Skorve

*uea*

La libroservo de UEa eldonis grandan katalogon pri ĉiuj libroj nun haveblan en la Internacia Lingvo.
Fariĝis granda kajero 256-paĝa en la formato de la jarlibro de UEA.
La katalogo rubrikigas la librojn laŭ enhavo, kaj oni facile havas superrigardon. Niaj plej novaj kajeroj ne ankoraŭ trovis sian lokon, ĉar tro novaj sed la orjubilean kajeron vi trovas sub la rubriko "Movado, lingvo, historio, interlingvistiko."
Persone mi (red.) iom miras ke ne estas en klarigoj de unu libro montrite al alia kiu "apartenas" al ĝi. Ekz sub "Cent Himnoj" staras: "Sen muziko", kaj nenio pri la muzika eldono - kiu estas registrita aliloke.
Vidante la ampleksom de la katalogo, oni ankaŭ miras, ke la Jarlibro registras kiel "pli grandaj bibliotekoj" tiujn, kiuj havas pli ol 300 volumoj. Tio ja estas bagatelo!

# KASET-KLUBO

Ekzistas tutmonda klubo de homoj, kiuj deziras korespondi per sonbendoj aŭ kasetoj. Tiu klubo havas sian sidejon en Usono, sed ĝiaj membroj loĝas en 34 landoj. Inter tiuj estas ankaŭ esperantistoj, kio jam estas interesa por ni. Sed la intereso estus ankoraŭ pli granda, se multaj esperantistoj partoprenus en tiu mondskala rondo. La jarkotizo estas tre malalta (nur 4$), kaj kontraŭ tiu sumo ĉiu membro ricevas kompletan adresaron de ĉiuj membroj en la tuta mondo (la lasta havas 64 grandajn paĝojn), kaj ĉiun trian monaton ankaŭ interesan gazeton en la angla. Ĝi enhavas suplemanton kun la adresoj de la novaj membroj. Mi ne dubas, ke se multaj esperantistoj scius, ke tiu klubo ekzistas, preskaŭ ĉiu, kiu havas magnetofonon, aliĝus. Tio donus du avantaĝojn: Unue, multaj esperantistoj povus "parole" interkonatiĝi, due, la ceteraj membroj konstatus kiom disvastigita estas la uzo de e. kaj multaj, serĉantaj homan kontakton, sed ĝenataj per la lingvaj baroj, eklernus esp. kaj venus al niaj vicoj. Cetere, por la esperantistoj kapablaj paroli aliajn lingvojn, tio estas facila maniero fari propagandon en medio, tute pretan akcepti ĝin.




Tiu klubo nomiĝas THE VOICESPONDENCE CLUB. La vorto signifas "voĉa korespondado". La fakto ke la adresaro kaj la bultenoj estas en la angla, ne devas esti baro por la esperantistoj, kiuj ne scipovas ĝin, ĉar mi proponis al la sekretario de la klubo esperantistan kunlaboron, kaj li entuziasme akceptis. Mi nun preparas tradukon de la dokumentoj de la klubo, kaj la peranto por kontinentala Eŭropo multobligos ĝin. Ili do estas tute pretaj akcepti nin: tiun ĉi okazon ni ne devas preterlasi! Tial mi konsilas al vi aliĝi al tiu interesa klubo kaj profiti ĝiajn servojn. Tion vi certe ne bedaŭros. Se vi deziras pliajn informojn, vi povas unue turni vin al mi.

Daniel LUEZ, 1, rue Victor-Faglain, F 02000 LAON.

## *helpo*

En Norvegujo okazis en oktobro grandskala monkolektado sub la nomo "Nødhjelp 77". (Tio signifas: Helpo dum mizero). La organizaĵo "Kirkens Nødhjelp" ( Helpo-organizaĵo dum mizero de la Eklezioj) aranĝis la agadon kiu dum la elektita tago - dimanĉo kun nomo "Tago de la pento kaj preĝo" - kolektiĝis ĉ 55 milionoj kronoj. En mia (la red.) paroĥo la kolektado okazis dum 2 horoj en la posttagmezo, kaj donis ĉ 40ooo kronojn. La paroĥo havas ĉ 4000 loĝantojn. Kompreneble ni ĝojas pro tiu signo, ke la kristana tezo pri amo al proksimuloj tiel penetris al la homoj, kaj ke institucio de la eklezioj estis tiele akceptata.

## *Islando*

"Ni trovis insulon, plenplena da surprizoj. Flugi en Islando ne kostas pli ol veturi per aŭtobuso. Ekzistas 10 foje pli da ŝafoj ol homoj. La lingvo estas nekomprenebla eĉ por Norvegoj; ĝi estas antikva norvega, sufiĉe malfacila. Tamen la angla ofte helpis. Malgraŭ la Vikinga sango la Islandanoj montriĝis tre ĝentilaj kaj helpemaj."

(El "Lumo", organo de Kanada Esp.As.)

## *KELI*

Keli raportas en sia lasta numero pri la kongreso, kiu okazis en Edinburgo en Skotlando. Partoprenis en tiu kongreso areto da gejunuloj, kio igas nin denove pripensi la eblecon ankaŭ dum Keli-kongresoj aranĝi ion pri-SEL-an.
Partoprenis en la kongreso ankaŭ nia Finnlanda NR Irja Klemola.

# unua helpo

Imagu, ke vi estas en restoracio. Persono ĉe la tablo subite sin prenas ĉe la gorĝo, kaj batalas por povi spiri. Li ŝajne bezonas tujan helpon.

Se li estas konscia, sed ne povas fari sonon, li verŝajne sufokiĝas pro io en la gorĝo, kaj ne havas kor-atakon. Baldaŭ post la unuaj simtomoj, li ekbluiĝas kaj perdas la konscion. Tiam li estas nur minutojn for de morto, kiun li per helpo povas eviti.

El "World Scouting" - kiu siavice tondis el "Boy Scouts of America" ni prenas ĉi tiujn konsilojn por savi viktimon de sufokado.

Du bazajn teĥnikojn oni evoluis. Unu estas la provo eltiri la sufokigan objekton per la fingroj aŭ teniloj, la alia estas la provo eligi la objekton per la forto de la aero, kiu estas en la pulmoj de la viktimo. Ambaŭ metodoj montriĝis uzeblaj ĉe infanoj kaj plenkreskuloj, kaj oni devus provi ambaŭ.

La helpo devas esti tuja se la vivo de la viktimo estu savita. Laboru laŭ tiu ĉi preskribo:

- Sendu iun por profesia helpo, sed ne atendu ĝis tiu helpo alvenos; donu tuj Unuan Helpon.


- Demandu la viktimon, ĉu li kapablas paroli. Se li estas konscia, sed ne kapablas fari sonon, vi povas esti sufiĉe certa pri sufokado. Ne provu helpi per frapado sur la dorso. Tio ne helpos, sed foruzos tempon.

- Unua bildo. Uzu tuketon tiel ke vi havas firman prenon, tiru la langon antaŭen tiel longe kiel eblas. Tio levos la sufokigan objekton, tiel ke vi povos vidi ĝin.


- Dua bildo. Uzu viajn mezan kaj montro-fingrojn kiel preniloj, kaptu la objekton kaj eltiru ĝin.

- Se tio malsukcesas, ekstaru malantaŭ la viktimon (Bildoj 1a, 2a,) kaj ĉirkaŭprenu per viaj brakoj ĉirkaŭ lian talion. Kunigu viajn manojn kontraŭ la stomako de la viktimo ĉe punkto tuj sub liaj ripoj. Premu per fortego en rapida premo supren. Ripetu tion plurfoje. Tio premas la diafragmon supren, kunpremas la pulmojn, kaj povas perforti elĵeton de la fremdobjekto tra la buŝo.

- Se la viktimo kuŝas surdorse (bildoj



1b, 2b), genue "sidu" sur liajn koksojn kaj metu unu manon tuj super lia umbiliko kaj faru la saman akran movadon supren/internen per la manplato. Ripetu la premon se necese.




- Se la fremdobjekto ne estas forprenebla per tiuj metodoj, uzu longan kuleron aŭ alian instrumenton por forpreni ĝin.
- Kiam la objekto estas for, uzu la buŝal-buŝo-metodon, se necese, por igi lin denove spiri. Kaj tenu la pacienton varma kaj trankvila ĝis la helpo alvenos.




# Dankon!

Kaj jen denove pasis járo. Jam mi redaktis la revuon dum multaj jaroj, kaj mi ne mirus, se vi nun dezirus novan stilon kaj tonon de la revuo. Aliflanke tiu ĉi laboro donas al mi multan plezuron, kaj mi pretas daŭrigi ĝin dum ankoraŭ kelka tempo, se tio plaĉas al la legantoj.

Ĉe la jarfino - ĉe la kristnasko - estas al mi nature danki. Danki pro la pacienco, kiun montras la legantaro, kaj pro la kunlaboro, kiun donas multaj. Pro la konsiloj, pro la kritiko, pro materialo uzebla, pro materialo neuzebla, pro ideoj.

Sed mi konscias, ke ĉio ĉi estus vantaĵo, se la sano ne sufiĉus. En mia Biblio mi trovas tiujn ĉi vortojn: "La beno de la Eternulo riĉigas, kaj malĝojon Li ne aldonas al ĝi." Laŭ mia kompreno, sano estas unu el tiuj riĉoj, kiujn ni ne povas aĉeti per mono, sed ricevas - aŭ ne ricevas. Kaj estas aliaj tiaj riĉoj. Unu havas iujn, alia havas aliajn. S E n i k o n s c i a s p r i i l i!

Al mi tial estas nature ankaŭ rekti mian dankon al Dio. Kaj precipe nun - kiam la jarfino proksimiĝas, kiam la kristnasko alvenos.



Al multaj la kristnasko estas tradicia festotempo, nur. Aŭ ĝi estas rememoraĵo pri bela legendo - bela, sed sensignifa.

Al mi ĝi estas signo de la Dia beno, pruvo de la valoro de la homo.

Kaj kion ajn vi pensas pri la kristnasko kaj pri religio: Mi deziras al vi la plej grandan kion mi povas imagi:

Dio benu vin kaj donu al vi benitan kristnaskon kaj prosperigan novan jaron!

Haro!

## N A C I A J   R E P R E Z E N T A N T O J

| | |
|---|---|
| Aŭstralio: | s-ro H.J.C. Brendel, 3/119 Kadumba Str., Yeronga - QLD 4104 |
| Aŭstrio: | f-ino Eva-Marie Fraunhofer, Badenerstr 7, A-2512 Tribuswinkel/Baden pr Vieno.<br>s-ro Franz Schwärzler, Rathausstrasse 2, A-6900 Bregenz. |
| Belgujo: | s-ro Gert van Damme, Marie Jose-laan 31, B-2600 Berchem. Tlf 031-3035.43<br>s-ro L.j. VanGulck, Lt.Lippenslaan 33 bus 1C, B-2200 Borgerhout. Poŝtk.to Belga Skolta Esp.Sekretario 000-0327460-85. Telefono (031)3688.08. |
| Brazilio: | s-ro Adonis Marcelo Saliba Silva, Av. Olegario Maciel, 274, Apto 1211 3000 Belo Horizonte, MG. |
| Britujo: | s-ro **David H. W i t h e y , 21. Brookfield Ave Waterloo, Liverpool L 22 3ye,** |
| Danlando: | s-ro Bjarke Nielsen, Erdalsvej 30, DK-2600 Glostrup. |
| Finnlando: | s-ino Irja Klemola, Nunna, SF-20660 Littoinen. |
| Francujo: | s-ro Patrick Deveughele, 53 Av.de Rigny, Appt 64, F-94360 Bry sur Marne |
| Germanujo: | s-ro Georg D. Winkler, Haroldstrasse 47, D-41 Duisburg 1. |
| Hispanujo: | s-ro S.Aragay Galbany, Bassegoda 40-3-1, Barcelona 14. Tel 333 80 81. |
| Irlando: | s-ro Frank Dobbs, 8 Ailesbury Grove, Dublin 4. |
| Italujo: | s-ro Fr. Abriani, Via Falconetto 24, I-37100 Verona. Tel 045-525173. |
| Japanujo: | s-ro Sinzo Sumiya, Daido Kagaku Sooti K.K.16, Suekirotyo Kitatu, Osaka. |
| Kanado: | s-ro John H.F.Hoyle, Box 421, Forest Ont.<br>Helpa NR: s-ro Paul Ronald, 45, 10th Ave., Roxboro, Queb. |
| Maroko-Agadir: | |
| Meksikio: | s-ro Jaime Javier Martinez Tellez, 8a, No 3604, Chihuahua. |
| Nederlando: | s-ro B.J.Wijmer, Vreebos 41, Zoetermeer/2280. Tel 079-215868. Poŝtkto 3335470 |
| Norvegujo: | s-ro H.A.Rosbach, Bamleveien 2, 3700 Skien. Tel 035 21848. |
| Novzelando: | s-ro D.B. Pease, 6a Bay Road St Heliers, Aukland 5. |
| Peruo: | s-ino J.de Skotte, Melecon Paul Harris 335/200 Barranco-Lima 4. |
| Portugalujo: | |
| Svedujo: | peranto s-ro Ragnar Hjorth, Kronobergsgt 25, s-11233 Stockholm. |
| Usono: | s-ro Allan Fineberg, 76 Seventeenth Ave, Paterson N.J. 07513. |

Informoj pri membreco:
En landoj kun Nacia Sekcio: Informiĝu ĉe NR kaj pagu al li la kotizon.

Individuaj membroj (nur en landoj sen N.R.!): Kotizo inkl. abono:
- Junuloj ĝis 18-jaraj: Ned gld 3.30 aŭ egalvaloro.
- Pliaĝuloj: Ned gld 5.00 aŭ egalvaloro.
- Subtenantoj: Minimume Ned gld 5.00 aŭ egalvaloro.

Prefere pagu la kotizon al la kasisto. Vidu p. 2.

Adresoj de la Centra Komitato: Vidu la duan paĝon.

Konstanta adreso de S.E.L.: Postbus 433, Zaandam, Nederlando.



En World Scouting septembro 1977 ni trovis la supran bildon faritan dum la unua Afrikana Ĵamboreo, kiu kunigis pli ol 5000 skoltojn el 22 landoj ĉe Jos, ĉefurbo de unu el la ŝtatoj en la federacio Niĝerio. Partoprenis eĉ skoltoj el Kanado, Francujo kaj Britujo. Kaj, kiel ni povas vidi, la partoprenantoj ankaŭ povis sperti afrikan folkloron dum la granda kaj varia programo.





# LA SKOLTA MONDO

Limtempo por manuskriptoj kaj anoncoj: 1-a de Februaro, Majo, Aŭgusto kaj de Novembro. Manuskriptojn sendu al la

Redakcio: Bamblevn 2, N-3700 Skien, Norvegujo.

NE ISSN 0037 - 6558

KUL